

Esperanta originala romano, laŭ Henri Vatré  
Claude Gacond, 68-a radioprelego, 1964.03.18 & 21

Atentu esperantistoj! Ĉi tie parolas la Svisa Kurtonda Radiostacio pri la esperanta originala romano. Vi aŭdas Claude Gacond.

La 29-an de februaro kaj 1-an de marto la svisa samideanaro grupiĝis en Lausanne okaze de jarkunveno de Svisa Esperanto-Societo. Inter la prezentaĵoj, kiuj okazis dum tiu manifestacio, ni citu belajn ĥorojn, spritajn skeĉojn, bone luditajn teatraĵojn, mirindajn sorĉaĵojn, longegan tedegan prezidantan raporton kaj interesegan prelegon de Henri Vatré pri la esperanta originala romano.

Ni hodiaŭ posedas poezian antologion, kiu ebligas al ni havi panoraman ideon pri la naskiĝo kaj evoluo de nia poezio. Mankas al ni proza antologio. Eble ĝin foje verkos Henri Vatré, kiu verŝajne estas en Esperantujo unu el la plej bonaj konantoj de la esperanta romano.

El lia prelego, kiun multoblige eldonos Esperanto-Edukistaro de Svislando, mi legos al vi la panoraman prezenton de niaj romanistoj. Eble trovu krajonon kaj notu la titolojn de la ĉefaj libroj kaj de ties aŭtoroj por vidi, se en via grupa biblioteko ne troviĝas polvokovritaj legendaj romanoj.

« Por nia publiko nuntempa, rimarkigas Henri Vatré, la tipo de la esperantaj verkoj estas sendube tiuj de Julio Baghy, kiu profitas kun tiuj de Raymond Schwartz de la plej vasta populareco. Liaj du romanoj pri la militkaptita vivo en Siberio, *Viktimoj* kaj *Sur sanga tero*, eminentas pro la stilo, konstruo, interna fajro, humuro. Ili tiom ligas la legantojn, ke malgraŭ la neverŝajno de la romantikaj figuroj, ni ne povas ne ŝati ilin, ĉar la aŭtoro scias kredigi al ni, kion li mem kredas.

El reala, terura kaj persona travivaĵo Baghy sukcesis fari fabelojn... »

Henri Vatré pensas, « ke la plej signifa verko de Baghy estas *Hura!*, parte brila socia satiro, parte utopio malpli sukcesa. Oni povus nomi la libron fulmo-trafita kverko.

La ĉeffiguro de alia romano, *Paŭlo Paal*, simpla kamparano, kiu evoluas ĝis esperanta eminenteco, estos eble la plej reala, plej bone motivita heroo de Baghy. Inter multe da siropo, Baghy sciis enĵeti ankaŭ iom da salo kaj pipro: li tre sprite mokas kelkajn tipojn de nia movado. Antaŭ ĉio li estas nia plej sorĉa rakontisto. Li kreis por ni tutan mitologion, portis lumon kaj varmon al miloj da homoj, kaj tuj vekis ĉe la legantoj ian mistikan, simpatian entuziasmon. Multaj verkistoj havas legantojn. Baghy posedas popolon da fidelaj admirantoj kaj ĉefe admirantinoj.

Tute alian temperamenton ni trovas ĉe Raymond Schwartz, verŝajne la plej granda, kompleta artisto en esperanta romano, pensas Henri Vatré. Raymond Schwartz staras firme en la realo, kiun li observas akre, sed kun indulgema humuro.

En *Anni kaj Montmartre*, malgaja rakonto pri delogita knabino, li konfesis: « Ni ne inventas la vivon, ni nur palpas ĝian pulson. Ni konstatas. ». Kaj tion li faras kun la okuloj kaj la koro en la ĝusta loko. Unu el la ĉefverkoj de la speco estas *Kiel akvo de l' rivero*, en kiu li vivigas por ni, egale majstre kaj ĉiam kun ĝusta tono, amuzajn scenojn kaj tragikajn aventurojn tra la du mond-militoj. Ĉe li la humuro viglas kvazaŭ ia sesa sentumo.

Multaj esperantaj verkistoj rakontas aventurojn, sed vera aventura romano, kiel ĝin imagas angloj, ankoraŭ mankas, konstatas Henri Vatré. La kutimaj motivoj de niaj romanoj estas amo, fantazio, socia kritiko kaj utopio, mistero, detektivaj enigmoj, sed ne aventuro en la strikta senco de l' vorto, kian ni trovas ekzemple en *Robinsono Kruzo*, *La Trezor-insulo*, ĉe Jules Verne, Karl May aŭ Saint-Exupéry.

Manke de virecaj aventuroj, eble plej logas bela am-rakonto, precipe por sentimentala leganto. Kiam tiu enŝovis la nazon en tian romanon, li aŭ ŝi atendas senpacience la momenton

Esperanta originala rimano, laŭ Henri Vatré  
Claude Gacond, 68-a radioprelego, 1964.03.18 & 21

kulminan de la kiso, kiu alvenas ofte nur sur la lastaj paĝoj. Ŝajnas, ke en tia verko la nura celo de viro kaj virino estas kisi unu la alian, eĉ se por tio ili bezonas travivi ducent paĝojn. En la verkoj de Baghy, ekzemple, ĉiuj virinoj estas kisindaj, eĉ... la aliaj. Se vi serĉas kison en rakonto de Baghy, tiam vi venis al la ĝusta adreso. Aŭskultu el *Paŭlo Paal* :

« Anika levis sian vizaĝon tute proksime al la lia kaj ŝiaj okuloj fermiĝis, ŝia buŝeto kissofire pintiĝis, la tikla magneta forto de ŝia sana korpo ekvipis la sangon de Paŭlo kaj iliaj lipoj kunfandiĝis en kiso sovaĝe arda. »

Se vi preferas pli sentimentalan agordon, legu *Printempo en la aŭtuno*, la favoratan verkon de Baghy :

« La lipoj de la studento unuiĝis al tiuj de la knabino... La lipoj kuniĝis, la larmoj miksiĝis. »

Kaj jen belega ekzemplo el Schwartz : « La buŝoj ne povis cedi. Ili kunfandiĝis en longan kison. Tiam, unuafoje, ambaŭ samtempe ekkonis, kio estas kiso atingita la limon de l' nedifineblo. Ili ploris kiel infanoj. Pro subita konkretiĝo de feliĉego ĝis tiam nur revita. »

Tia larmado post kiso havas noblan kaj antikvan precedencon en la Biblio. Genezo 29/11 diras : « Kaj Jakob kisis Raĥelon kaj laŭte ekploris. »

Post tiuj belaj kisaj rakontoj venis la momento adiaŭi vin. Venontsemajne ni daŭrigos la ekzamenon de la laboro de Henri Vatré pri la esperanta originala romano. Tiam vi aŭdos pri multaj aŭtoroj kaj libroj, kiuj ludas gravan rolon en nia literaturo, kvankam ofte la esperantistaro ilin ne konas.

Nome de Svisa Kurtonda Radio-Stacio Claude Gacond diras al vi : Ĝis reaŭdo !

-oOo-